

KOMENCANTO

revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Kornjuhina Anna [Barnaul, Rusio]

2004

Kiel Tan Thiuzhu, Prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo iĝis esperantisto
Ĉinio bela kaj fabela — literaturaj provoj de niaj legantoj — gramatiko
serioze kaj amuze — neelpensitaj historioj — afonismoj — anekdotoj
diversaj ondoj el bunta mondo — invitoj kaj informoj — korespondu!

1

Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian revuon

Argentino Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

Aŭstralio Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

Brazilo Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

Britio Eric Walker, Downham Reach Cottage, Nacton, Ipswich, IP10 0LA

Ĉeĥio Vladislav Hasala, A. Dvorská 1, CZ-696 62 Strážnice

Ĉinio Ĉina Esperanto-Ligo, PO Kesto 825, CN-100037, Beijing

~ S-ro Cui Jiayou, P.O. Kesto 448, Lixin 158120, Jixi, Heilongjiang

Danio Revuservo de Dana Esperanto-Asocio Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800, Nykobing F.

Estonio Virve Ernits, Villimaa 17 — 8, EE 93812, Kuresaare.

Finnlando Heta Kesala, Kalamiehenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

Francio Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

Germanio Dr. Wolfgang Schwanzler, Pfarrer-Secger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

Hispanio Pablo Vicente Valero, adv. Obispo Quesada n=BA 14, 6D, ES-40006, Segovia.

Irano Irana Esperanto-Centro, P.O. Kesto 17765-184, TEHRAN

Italio Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosi, 38, 20143, Milano.

Italio, Kroatio, Slovenio Višnja Branković

Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste

Irlando Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Japanio Japana Esperanto-Instituto, JP-162-0042, Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-matŭ 12-3

Katalunio Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

Kubo Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, Havano

Litovio Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

Norvegio Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo

Nov-Zelando David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004

Pollando Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

Portugallio Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto, N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa

Svedio SEF, Lisbet Andreasson, Sodra Rorum, Husartyckeavagen 29, SE — 24294 Horby

Svislando Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

Usono Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

Redakcie

Karaj legantoj!

La unua numero de "K-2004" estas antaŭ vi. Foliumente ĝin, vi trovos preskaŭ ĉiujn kutimajn rubrikojn kaj temojn sur siaj lokoj.

Al la novaj abonintoj ni klarigas, ke unu el la plej gravaj celoj de KOMENCANTO estas aktivigi esperantistojn, inviti ilin al praktika uzado de Esperanto, doni al ĉiu realan eblon esprimi sin sur paĝoj de nia revuo! Se ĉiu el vi, karaj legantoj, sendos al la redakcia adreso almenaŭ unu sian originalan aŭ tradukitan verkon, aŭ bildon... ni plezure duobligos amplekson de nia revuo!

Lige al la Universala kongreso UK-89 en Pekino ĉi-foje abundas materialoj pri Ĉinio. En tiu ĉi numero Prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo *Tan Thiuzhu* rakontas pri sia esperantistigo. Poste sekvas diversflanka prezento de Ĉinio: "Ĉinio bela kaj fabela". Ĉe la rubriko "Invitoj kaj informoj" ni detale konatigas vin kun Esperanto-Redakcio de Ĉina Radio Internacia.

Ni esperas, ke vin plezurigos du humuraj tradukverkoj "Taglibro de la kato Simon", prezentita de *Belousov Igorj*, Rusio, kaj "Venĝo de l' Magiisto", kiun trovis kaj esperantigis *Johan' Luko Tortel* el Francio. Post tiuj du brilaj humuraĵoj sekvas kolekto "Ĉu vi scias, ke...?"

En la gramatikaj paĝoj ni publikigas interesan kaj facile legeblan artikolon "Kiuj lingvoj similas unu al la alia", trovita kaj tradukita de *Sergej Paĥomov* el Rusio. Rakonto de *Ludmila Leksina* kaj traduko de rakonteto de L. Tolstoj far *Jelena Jaroŝenko* en rubriko "Tempo kaj homoj" agordos vin lirike kaj filozofie.

Ĉiuj ceteraj tradiciaj rubrikoj vin atendas kiel kutime.

Agrablan legadon!

KOMENCANTO

2004 numero 1 // (45) // 6 numeroj jare
regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavec
konstanta kunlaboranto Raja Kudrjaveca
adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: komencanto@r66.ru

abontarifo por 2004:

internacia tarifo: 15 eŭroj

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: \$13;

aŭ por ĉiuj — 16 IRK

konto ĉe UEA: vkud-a

rusia tarifo: 150 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, аб. ящ. 132.

Oni rajtas uzi bildojn kaj verkojn el "K".
Sola kondiĉo - nepre menci i KOMENCANTO'n, la
nomojn de la aŭtoroj kaj ties loĝlokojn.

Prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo, multjara kunlaboranto de revuo "El Popola Ĉinio"

Mi estas feliĉa pro Esperanto



Kara samideano Viktor Kudrjavcev, al via demando, kiel mi esperantistiĝis, mi respondu koncize sed sincere, ke mia esperantistiĝo estas kreaĵo de la plana ekonomia sistemo, praktikata de la ĉina registaro en la sesdekaj jaroj. Sed mi amas Esperanton.

Eble iuj maljunaj rusaj samideanoj scias, ke frue en 1950, unu jaron post la fondiĝo de la nova Ĉinio, jam aperis la revuo "El Popola Ĉinio". Ĝi servigis Esperanton por raporti al la mondo pri Ĉinio kaj la ĉina Esperanto-movado. Cele kulturaj profesiajn esperantistojn por la redakcio de "El Popola Ĉinio" kaj ankaŭ por la Esperanto-sekcio de Ĉina Radio Internacia, kies Esperantaj elsendoj komenciĝis en 1964, la Ĉina Eduka Ministerio funkciigis Esperantokurson en la Pekina Brodkasta Instituto en 1964, kaj mi estis unu el ĝiaj lernantoj.

Antaŭ tio mi havis neniun scion pri nia lingvo. Mi bone memoras, ke en la unua leciono nia instruisto Venlo Fon, tre fama ĉina veterano, kiu verkis "Grandan Vortaron Esperanto-Ĉinan" kaj "Fundamentan Esperantan Lernolibron", donis al ni bazajn sciojn pri Esperanto, pri d-ro Zamenhof kaj lia idealo, pri la lingvaj trajtoj de Esperanto kaj la rolo de Esperanto kiel internacia helpa lingvo, kaj fine li kun verve kantis al ni la himnon "La Espero".


Ĉar ĉiuj kursanoj antaŭe lernis la rusan lingvon kaj iuj ankaŭ iom la anglan, ni facile trovis en komparo la avantaĝojn de Esperanto.

Por stimuli nian lernadon, post kiam ni jam ellernis la bazajn elementojn de la lingvo, venis iutage al nia kurso s-ro Hujucz, tiama prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo kaj vicministro de la Ĉina Kultura Ministerio. Li eksplikis la uzeblecon de Esperanto per sia propra travivaĵo. En 1930, li faris septagan viziton al Moskvo survoje al Ĉinio post lernado en Francio. Tie li estis varme akceptita de sovetuniaj esperantistoj kaj multon rigardis en ilia akompano. Reveninte hejmen, li verkis libron "Impresoj pri Moskvo", kiu havis grandan influon al tiamaj ĉinaj gejunuloj. La persona ĉeesto de Hujucz kaj lia rakonto multe inspiris nin kaj ekscitis nian intereson kaj entuziasmon por Esperanto. Ni rapide progresis en nia lernado.

Baldaŭ mi provis legi Esperantajn literaturaĵojn. Mi aĉetis en la Libroservo de Guoĵi Ŝudian "Fundamentan Krestomation" de Zamenhof, en kiu estas kaj originalaj kaj tradukitaj verkoj, kaj iuj artikoloj estas tre belaj. Ĉar antaŭe mi studis la rusan lingvon kaj ege ŝatas la rusajn klasikajn literaturaĵojn, mi aĉetis ankaŭ la Esperantan version de "Patroj kaj Filoj", "La Revizoro" kaj aliaj. Legado de tiuj literaturaĵoj multe helpis min por levi mian lingvonivelon. Post lernohoroj mi kaj miaj kunlernantoj foje kaj foje partoprenis en regulaj renkontiĝoj de pekinaj esperantistoj por lertigi nian paroladon.

Post fino de la kurso mi fariĝis profesia laboranto en la redakcio de "El Popola Ĉinio". De tiam ĝis mia emeritiĝo en la lasta jaro mi laboris por EPĈ per Esperanto jam 38 jarojn. Dum tiom longa tempo mi tradukis kaj verkis por ĝi kaj fine fariĝis ĝia vicĉefredaktoro. Mi ankaŭ esperantigis kelkajn ĉinajn novelojn, teatraĵojn, kompilis kune kun la aliaj Ĉina-Esperantaj vortarojn kaj gvidis esperantajn kursojn. Retrorigardante mian vivon, mi sentas grandan dankemon al Esperanto, ĉar ĝi ne nur estis mia vivrimedo, sed ankaŭ alportis al mi grandan plezuron spirite. Ĝi malfermis al mi la vastan kaj buntan mondon kaj havigis al mi amikojn en multaj lokoj de la terglobo. Pro Esperanto la mondo fariĝas paca kaj pro Esperanto mi estas homo feliĉa!

Ni prezentas al vi landon de ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto. Ĝi estas vere mirinda kaj vizitinda parto de nia planedo!



Ĉinio – (Ĉina Popola Respubliko) estas ŝtato en Centra kaj Orienta Azio. Areo 9,6 milionoj kvadrataj km. Loĝantaro superas 1400 milionoj da homoj. Ĉefurbo – Pekino.

Geografio

Ĉinio estas grandega lando, kies teritorio etendiĝis de la norda rivero Amur ĝis la tropikaj palmaj insuloj en Suda-Ĉina maro je 5500 km, de montaroj Pamir en okcidento ĝis duoninsulo Ŝandun en Oriento je 5200 km. Longeco de la ŝtataj limoj de Ĉinio estas pli ol 38 miloj da kilometroj.

Unu el du grandegaj riveroj de Ĉinio Jangzio kvazaŭ disigas la landon je sudan kaj nordan parton. La dua granda rivero estas Huanĝe.

La suda parto de Ĉinio estas patrujo de teo, tie oni trinkas teon jam pli ol 2000 jaroj! Kaj de tie tiu aroma trinkaĵo penetris en Japanion, Koreion, Rusion, Eŭropon...

Sude troviĝas Sud-Ĉinaj montaroj, kaj Okcidente — Tibetaj montaroj kaj Himalajaj montaroj, kies altaj pintoj superas 8000 metran altecon.

Loĝantaro

Kalkulado de la loĝantaro de la 1935 jaro nombris la loĝantaron de Ĉinio 601 milionoj. En 1957 jaro – 657 milionoj da homoj, kio tiam konsistigis jam unu kvaronon de la tuta homaro. 1986 jaro jam 1060 milionoj. 1990 – 1134 milionoj. 90 % de la loĝantaro loĝas sur 1/3 teritorio de la lando, nome oriente, proksime al la marbordoj. Entute en Ĉinio oni kalkulas pli ol

Ĉinio bela

50 naciecojn, sed plejparto de la loĝantaro estas ĉinoj.

Hieroglifa skribo

La ĉina skribo baziĝas sur hieroglifa sistemo. Aparte aŭ kombine hieroglifoj esprimas iun sencan kaj ofte prezentas apartan vorton. La plejparto de hieroglifoj restas senŝanĝaj jam dum pli ol 2000 jaroj. Iuj el ili aperis el desegnaĵoj: "homo", "suno" "arbo". Du arboj signifas "arbaron". Sed la plejparto de ili estas abstraktaĵoj. Neniu scias ekzakte, kiom da hieroglifoj ekzistas entute. Por legi gazetojn sufiĉas scii 3000. En la meza vortaro oni kalkulas 8000, sed en la granda vortaro – 47000. Nenia ligo inter signoj kaj ties sonoj ekzistas, necesas nur parkerigi ilin. Diversaj hieroglifoj povas soni same. Por diferencii ilin inter si oni altigas, malaltigas voĉon.

Kiel modelan prononcon oni akceptas pekinan dialekton, kiu nomiĝas "mandario". Ekzemple, silabo "ma" povas signifi kaj "patrino", "ĉevalo", "insulti" kaj, prononcata sen tono, signifi demandon. Diferenco en prononco estas signifa, sed skribado ĉie estas la sama.

Historio

Ĉinio aperis kiel unu el la plej antikvaj regnoj en homa historio. En la 2-a jarmilo antaŭ nia erao (a.n.e.) aperis regno Inj, en la 9-a jarcento a.n.e. ĝin konkeris triboj de ĉjou, kies ŝtato poste disfalis je kelkaj memstaraj regnoj (Ci, Czinj, Cinj ktp). En la 6-3 jarcento a.n.e. aperis kaj formiĝis Konfuceanismo, Daoismo kaj aliaj filozofiaj skoloj. En la 3-a jarcento la imperiestro de la regno Cinj kunigis ĉiujn regnojn sub sian potencon. La imperion Cinj ŝanĝis imperio Hanj, (206 a.n.e. – 220 de nia erao). Tiutempe aperis komercaj centroj kaj ekfunkciis La Silka Vojo, kiu ligis centran Ĉinion kun Mezazio, Proksima Oriento kaj Eŭropo. Konfuceanismo iĝis la ŝtata ideologio, kiu apogis imperiestran potencon. En la 3-4 jarcentoj de nia erao Ĉinio denove disfalis je kelkaj memstaraj regnoj.

Vidindaĵoj

Ĉinio estas lando de multegaj historiaj monumentoj. Pli ol 240 el ili havas tutmondan signifon.

La Granda Muro

La plej fama kaj konata el ili estas unika fortikaĵo - La Granda Muro. Ĝi etendiĝis je pli ol 4000 km laŭ Norda Ĉinio. Pri la Granda Muro de Ĉinio multaj homoj jam aŭdis aŭ legis, iuj eĉ jam ĝin vizitis, sed malmultaj homoj scias, ke ĝi estas surtera konstruaĵo videbla de sur la luno!


La konstruado de la Granda Muro startis en la 5-a jarcento antaŭ nia erao, en la periodo de Militantaj Regnoj, kiam multaj relative grandaj urboj jam konstruiĝis en la Centra Ĉinio. Tiujn urbojn ofte prirabis la nomadaj triboj, kiuj loĝis norde de la montaroj Yanŝan kaj Yinŝan. Estinte lertaj arkpafistoj kaj rajdistoj, ili atakis kaj forkuris kiel vento. Por kontraŭstari tiujn invadantojn, la regnoj Yan, Zhao, Wei kaj Qin konstruis muregojn laŭlonge de la montegoj. En la 3-a jarcento antaŭ nia erao, kiam la unua imperiestro de la dinastio Qin sukcese venkis ĉiujn aliajn ses regnojn kaj fariĝis la unua imperiestro de la unuigita lando de Ĉinio, li ordonis al sia generalo Meng Tian kunigi la muregojn kaj ilin etendigi.



kaj fabela

Tricent mil soldatoj kaj kamparanoj plenumis la taskon, tiel ke finfine formiĝis kontinua murego. Oni faris la plifirmigon kaj renovigon en la sekvantaj dinastioj. La konstruado estis finita en la 3-a jarcento de nia erao.

Sur ĝia supro povis veturi ĉevalĉaroj (po 5 unu al la alia) aŭ iri soldatoj (10 homoj ŝultro-je-ŝultro). Post ĉiu 200 metroj situis Gardaj Turoj. Laŭlonge de la Granda Muro situis 14 grandaj strategiaj trapasejoj.



Maŭzoleo de la Unua Imperiestro

En la ĉina historio, Ying Zheng, la Unua imperiestro de Qin-dinastio, estis ambicia suvereno. Li surtroniĝis en la aĝo de 13 jaroj. Dum 10 jaroj li konkeris la aliajn 6 regnojn, unuigis Ĉinion, kaj fondis la unuan centralizisman feŭdan dinastion Qin (221-206 antaŭ nia erao) en la ĉina historio.

Tuj post sia surtroniĝo, Ying Zheng komencis konstrui por si mem maŭzoleon ĉe la piedo de Liŝan-monto, oriente de la nuna urbo Xi'an. 720.000 da homoj partoprenis en la konstruado, kiu daŭris 37 jarojn. Historiaj libroj notas, ke en la maŭzoleo estis haloj, dormohaloj, turoj, pordegoj kaj muroj internaj kaj eksteraj. Ili estis ekstreme luksaj. Subtere estis ne nur palacoj kaj sidlokoj de la korteganoj, sed ankaŭ multaj trezoroj. Tie estis riveroj kaj lagoj el hidrargo. La maŭzoleo estis ekipita per multaj kaŝitaj sagpafiloj kontraŭ ŝtelado.

La terakotaj militistoj kaj ĉevaloj troviĝas en 3 kavoj. En la loko je 5 metroj profunde sub la tersurfaco, imponas la majesta formacio: la avano konsistas el 3 horizontalaj linioj, po 68

militistoj por ĉiu linio, kun pafarko en la mano kaj sagujo sur la dorso. Tuj post ili estas infanterianoj, 6 militaj ĉaroj kaj 38 kolonoj.

La militistoj ĉiuj marŝas kun la vizaĝo al la oriento. La militistoj kaj ĉevaloj estis faritaj laŭ la formo kaj grandeco de veraj homoj kaj ĉevaloj. Ili portas kun si verajn armilojn.

Arkeologoj konstatis, ke la terakota legio nombras entute pli ol 7 mil militistojn kaj ĉevalojn kun ĉ. 100 ĉaroj, sed ĝis nun oni elterigis nur 1400. Oni elterigis ankaŭ grandnombrajn armilojn, inkluzive de 2 spadojn, kiuj ankoraŭ brilas kaj tre akras post pli ol 2 mil jaroj subtere. Oni humure diras, ke la menciitaj terakotaj militistoj kaj ĉevaloj servis kiel gvardio sur la antikva Silka Vojo.

La Granda Budho

Antaŭ 1200 jaroj bonzo Haitong decidis elĉizi en la monto budhan statuon, por ke la senlima povo de la Budho protektu la estaĵojn. Dank' al penado de kelkaj generacioj dum 90 jaroj, la ŝtona figuro de la Granda Budho estis elĉizita sur la monto Leŝan.

La Granda Budho altas 71 metrojn. La Budho kun harmoniaj vizaĝtrajtoj aspektas tenere kaj milde. Tamen starante sur ĝia piedo, oni ne povas klare vidi ĝin en la tuto, kaj en la okuloj de turistoj, verŝajne ĝi havas nur paron da piedoj. Sur ĝia pieddorso povas sidi cent homoj samtempe. Sur la rivero antaŭ la budha statuo oni povas rigardi la statuon en la tuto.

Templa Ensemblo

En Pekino konserviĝis multaj historiaj vidindaĵoj, inter ili Imperiestra Palaco kaj parto de la Urba Mura Fortikaĵo. Apartan atenton meritas la Templo Ensemblo de la Tradicia Ĉina Kulto – Templo de la Ĉielo, konstruita en 15-a jarcento. Ĝi konsistas el la Altaro de Ĉielo, Templo de la Ĉiela Majesto, Templo de la Preĝoj por bona rikolto. Altaro de Ĉielo estas ronda trivela konstruaĵo ĉirkaŭata de ronda muro kun kvar pordegoj. Sur la supra placeto pasis ceremonioj de la oferdonaco al la Ĉielo.

La Placeto havas tre bonan resonancon, ju pli oni proksimiĝas al la altaro, des pli la sono plifortiĝas, kio donas iluzion de la senpera komunikado de la Imperiestro kun la Ĉielo. La Templo de la Ĉiela Majesto estas ĉirkaŭata de la specifa muro – “Muro de la revenantaj sonoj”. Se susure mallaŭte prononci vorton, starante vizaĝe al la Muro, en ajna loko de la Muro oni povas klare aŭdi reeĥon. La sekreto estas en la specifa konstruado de la brikoj, la fenomeno ĝis nun mirigas sciencistojn.

Tradicioj

Tradicia ĉina festo de Printempo, simile al Kristnasko por kristanoj, estas por ĉinoj la plej grava festo, kiu havas tre majestan signifon. Tamen “jaro” ĉe ĉinoj kaj astronomia jaro iom diferencas. Antikva Ĉinio estis agrikultura lando kaj veno de la jaro estis ligita kun veno de printempo kaj revivigo de ĉiuj kreskaĵoj.

En tiuj tagoj kolektiĝas la tuta familio. Ĉiuj rapidas hejmen el diversaj partoj de la lando.

Festo de Printempo – estas komenco de la jaro laŭ tradicia Luna ĉina kalendaro, kiu venas en la unuan Plenlunon en periodo inter 20 jan. kaj 20 feb. Ĝi havas longan historion, ligitan kun la moroj de oferdonoj al Dioj, proksimume en epoko 16-9-aj jarcentoj antaŭ nia erao. La festo daŭras pli ol unu monaton. Plej gravaj tagoj estas veno de la Nova Jaro kaj la unuaj tri tagoj. En Ĉinio tiuj tri tagoj estas oficialaj ŝtataj festotagoj.



Ju. Ŝutova

Esperantigis Belousov Igorj [Engels, Rusio]

Taglibro de kato Simon

La 23-a de aŭgusto

Hodiaŭ mi fariĝis ĝuste dumonata. Bedaŭrinde, tiu ĉi dato koincidis kun malagrabla okazaĵo en mia vivo: min oni donacis. Ĝuste, fordonis, kiel oni diris, “en bonajn manojn”. Hm... ne scias, ne scias mi, kiomgrade tiuj ĉi manoj estas bonaj. Hieraŭ mia patrino ploris kaŝe, forviŝante larmetojn per sia longeca vosto. Mia patrino estas elstara belulino en nia distrikto. Oni diras, ke mi tre similas mian patrinon, ĝuste estas kopio. Mian patron mi ne scias, sed tamen supozas, kiu ĝi povas esti... Nur unu granda flavruĝa kataĉo ĉiam sencele vagadas apud la domo, kaj mi pensas, ke ĝuste li kulpas je mia naskiĝo.

Vi, eble, jam rimarkis, ke por sia aĝo mi estas tre saĝa kaj inteligenta. Komprenu: inteligenta familio, bona edukado, la mastrino – tre saĝa virino, ĉiuloke estas libroj, ĉiun vesperon aŭdeblas legado de verkoj de klasikuloj, akompane de la muziko de elstaraj komponistoj, ktp ktp... mi deflankiĝis... Sed mi esperas ke en estonteco tiu ĉi taglibron oni publikigos, kaj la mondo ekscios, ke ankaŭ inter la katoj ekzistas genioj!

Hodiaŭ matene oni min vekis por donaci...

Mi konfesas, ke ne atendis, ke oni min, kvazaŭ iun objekton, donacos al iu ajn!

Post unu horo mi jam observis angulojn de nova loĝejo. La domo estas malgranda, sed, feliĉe, ĉi tie estas mallaŭte kaj trankvile. La nova mastro, ŝajnas, estas bona homo. Regalis min per lakto kaj disponigis plenan liberon! Nu, ni vivos – ni vidos!

La 27-a de aŭgusto

Ho, kiel mi eraris, kiam skribis, ke mia nova domo estas modelo de trankvileco kaj mallaŭteco! Hieraŭ alvenis infanoj de la mastro, kiuj ripozis ie en vilaĝo dum someraj ferioj. Ili estas duopo... Knabino, longa maldika persono kun akutkriema voĉo, dum unua vespero provis kuŝigi min dormi al si sur la lito. Mi ribelis, mordis ŝin, sed tio ne helpis. Ŝi alpremis min per kubuto kaj kuseno. Estis malfacile spiri, sed mi decidis atendi, kiam ŝi ekdomnos, kaj forkuri. Almenaŭ unu horo Fifeino, tiel mi ŝin nun nomas, babiladis kun sia frato, kiu ankaŭ estas ne pli bona ol ŝi (ektiris min dufoje je la vosto!). Al la frato mi donis nomon Tiraneto. Al li ĝi ideale konvenas! Liberiĝis mi malfrue, nokte, forte ĉifita, ekdormis ĉe la mateno...

Ankaŭ al mi oni donis nomon... Nun mi devas reagi al *Sjomka*. Mi preferas pli noblan formon: *Simon*. Nutris oni min hodiaŭ per kaĉo, kuirita je akvo. Tre abomena manĝaĵo! Mia kata Dio, kien mi trafis!



Perevalov Jurij [Lesnoj, Rusio]

La 2-a de septembro

Fifeino montris min al siaj amikoj. Ili kriegis pro la admiro kaj premadis mian turmentitan korpon. Tiraneto decidis ekscii – ĉu estas ĉe mi la puloj, kaj por tio ekkaptis min je la felo, levis min kaj komencis kalkuli ĝis dek, atendente, kiam mi ekpetos pri la indulgo. Mi heroe silentis, kvankam pro la ofendo kaj doloro mi volis kriegi...

De ĉagreno mi kaŝis min sub la divano, lasante sen atento alŝovitan al mi pecon de kolbaso...

La 15-a de septembro

El ĉiuj familianoj nur la majstrino ŝajnas al mi normala homo, kiu manĝigas min, karesas kaj savas de siaj frenezaj geinfanoj. Nur sur ŝiaj manoj mi povas trankvile murmuri, rememorante mian feliĉan infanecon. Kien, kien vi foriris, miaj oraj tagoj...

Pri bona muziko mi delonge forgesis, ĉar en tiu ĉi domo ĝin oni ne aŭskultas, sed tion, kio sonas el la magnetofono – mi hontas nomi muziko.

La 23-a de septembro

Tri monatoj estas al mi hodiaŭ. Neniu pri tio rememoris... Mi eksaltis sur la komodon kaj rigardis en la spegulon. Jes... Kiel mi malbele ŝanĝiĝis! Nur antaŭ unu monato mi estis lanuga, gaja kateto. Nun mia aspekto “deziras esti pli bona”... Ve! Ĉiun tagon mi devas memorigi pri mi per laŭta miaŭo, alie mi povos resti sen manĝaĵo, kaj tio jam kelkfoje okazis. Sed kion mi manĝas! Estas teruro! Restaĵoj de supo, en kiu naĝas buletoj, neofte oni donas al mi kolbasrestaĵon aŭ nemanĝeblan kartilagon. Restas demando – por kio tie ĉi mi estas bezonata? La katoj servas por ornamado de domo kaj por bonstato de familio. Nin oni devas ami kaj karesi! Tamen mi vidas absolute malan bildon. Kio estas la senco de mia vivo? Kiu respondos?

La 11-a de oktobro

Mi konsterniĝis. Ŝi estas belega! Ŝi estas plej netera kaj magia en subluna mondo! Kiam mi ekvidis ŝin unuafoje, ŝajnas al mi, ke en tiu momento io okazis al mi! Fulmsimile! Ne, mi sentas, ke mi devas ŝin priskribi. Do, ŝi havas belan felkoloron, io inter arĝenta kaj cindra, grandegajn blujajn okulojn kaj tian teneran voĉeton, de kiu simple spasmas la piedoj. Verŝajne mi enamiĝis. Tio ne povas esti, ĉar ... ĉar ŝi... Simple ŝi reklamas per televidilo la katan manĝaĵon "Wiskas". Kiun tagon mi sidas apud la televidilo kaj senfine rigardas sur la ekranon. Verŝajne ŝi refoje aperos kaj karese ridetos, kiam klinos sian belegan bestkapon al la telero kun manĝaĵo. Jen, kion manĝas kati-
noj en ĉiuj konvenaj domoj! Sed mi?!...

La fino de novembro

Ĉio estas finita. Ŝi malaperis... Anstataŭ ŝi sur la ekranon aperis liphara flavruĝa kataĉo, rememorante al mi per sia aspekto mian patron. Oni trovis, ne eblas esprimi, per kiu anstataŭi mian adorantan arĝentan stelon! Mi sincere deziris al tiu dika kataĉo almenaŭ misgluti tiun "Wiskas"-on, kiun li manĝis kun tia plezuro!

La 9-a de decembro

Hieraŭ mi penis forkuri. Malsukcese... Oni kaptis min kaj ŝlisis en malluma necesejo. La kaŭzo de mia forkuro estis tre simpla kaj terure absurda. Mi forŝtelis de sur la tablo peceton de fiŝo. Mi scias, ke tia konfeso, kiel mia agaĉo, makuligas mian reputacion, sed la fiŝo tiel alloge odoris, ke mi ne povis elteni! Oni min batis punige, batis per malseka ĉifono...

La 27-a de decembro

La mastro alportis abieton. Fiodoro de ĝi estas netolerebla! Fifeino kaj Tiraneto ekkriegis, ŝajnas al mi, de ĝojo. Strange! Malforta, maldika arbo, kiu aldone pikiĝas. Ĝin kripligis, kiam pendigis al ĝi sengustajn (en ĉiuj sencoj) brilaĵojn. Ili tion nomas – ornamado. Sub la abieton oni metis la donacojn al la familianoj. Por mi tie ne estis donaco, sed mi kvar tagojn antaŭe fariĝis kvinmonata. Oni povas diri, kata jubileo! Sed... neni pri ĝi, kompreneble, rememoris...

La 1-a de januaro

Oni proverbas, ke kiel oni renkontas Novjaron, tiel oni travivas ĝin. Jes... Mi renkontis Novjaron sidante en la malluma necesejo. Apud mi staris telero kun restaĵoj de fiŝa salato. Fiodoris, la humoro estis aĉa, perspektivoj por la estonteco plej malbonaj. Nur matene oni min liberigis. .. Malnoble, ha, kiel malnoble kun mi oni agis.! Venĝe mi trairis en la kuirejon kaj formanĝis ĉion, kio restis sur la tablo. Poste mi kaŝis min en la ŝrankon, kie ĝis nun troviĝas. En la ŝranko estas mallume kaj polve, sed seke kaj sendanĝere. Kial mi ne renkontis Novjaron ĉi-tie?

La 15-a de februaro

Neatendite mi komprenis, ke mi amas mian mastri-
non. Ĉarma, bonkora virino! Nur de ŝi mi vidis ĉion bonan en tiu familio. Se iam mi forlasos la domon, nur pri ŝi mi rememoros.

Hodiaŭ mi babiladis kun la najbara kato sur la balkono. Strange, flank'-ĉe-flanke ni vivis dum duonjaro, sed konatiĝis nur antaŭnelonge. Oni nonas lin *Timoha*. Li demandis min: "Kion mi pensas pri kataj festoj de Marto? Mi respondis, ke ne scias...". "Ne gravas!" – diris Timoha. – "Mi trovos al vi amikinojn! Mi konas unu belan katinon de la dua etaĝo. Mi vin iam konatiĝos." Mi senpacience atendas.

La 25-a de februaro

Mi rigardis min en la spegulo. Evidentiĝis, ke mi estas bela! Eĉ iom dikiĝis, fariĝis pli impona. Ŝajnas al mi, ke mi havos sukcesojn ĉe la kati-
noj! Hieraŭ mi denove vidis ŝin en songo, en la sama el reklamo de "Wiskas"... Ŝi estas mia idealo, bedaŭrinde, neatingebla. Pli kaj pli ofte mi ŝtelas bongustajn pecetojn de sur la tablo. Mi komprenas, ke mi morale degeneras, sed ne povas kontraŭstari! Certe tio estas la patraj trajtoj! Ho, mia patrino, kion vi pensis?! Verŝajne, nenion, sed mi suferas...

La 8-a de marto


Hodiaŭ mi vidis najbarinon de la dua etaĝo. Kompreneble, ŝi tre malproksimas de mia idealo, sed la naturo postulas sian... Mi penis verki ion poezian kaj kanti al ŝi, kiam ŝi promenis sur sia balkono. Ŝi aŭskultis min kun intereso. Evidente ke niaj interrilatoj jam komenciĝis. Verŝajne, aspekte mi estas pli simpatia, ol Timoha. Verŝajne... mi venkos!

La 15-a de marto

Jen Ĉio. Hodiaŭ mi foriris el la domo kun Musja, tiel oni nomas mian amatinojn. Ni devas konstrui modelan katan familion.

Adiaŭ ĉiuj! Kaj la Mastro, kaj mia ĉarma mastri-
no! Eĉ Fifeino kaj Tiraneto.! Finfine la kato kaj kati-
no – estaĵoj liberaj...

En tiu ĉi loko la Taglibro de la virkato Simon deŝiriĝis...



S. Leacock: Literary Lapses
esperantigis Johan' Luko Tortel [Parizo, Francio]

La venĝo de l' Magiisto

— Nun, Gesinjoroj, diris la magiisto, montrante, ke la tuko estas nepre malplena, mi naskos el ĝi Orfiŝon en fiŝujo. Ek!

La tuta spektantaro diris:

— Mirakle! Kiel li kapblas tion?

Sed la kompetentulo el la unua vico ĉirkaŭ-flustris:

— Li antaŭ-kaŝis ĝin en sian manikon.

Tiam la ĉirkaŭantoj konsente kapjesis al la kompetentulo, aprobante:

— Ho! Jes, kompreneble!

Kaj ĉiuj en la spektaklejo flustris:

— Li antaŭkaŝis ĝin en sian manikon!

— Mia venonta lertaĵo, diris la magiisto, temos pri la famaj Hindiaj ringoj. Rimarku, ke la ringoj prezentiĝas disaj; per mia blovo mi kunigos ilin (Klakad', klakad', klakad') ek!

Aŭdiĝis ĝenerala zumo de surprizego, ĝis la kompetentulo murmuris:

— Li certe havis alian ringaron en la maniko.


Denove ĉiuj kapjesis kaj ehe flustris:

— Li certe havis alian ringaron en la maniko.

— Nun, daŭrigis la magiisto, mi montros tre amuzan lertaĵon, per kiu mi kapblas eltiri el ĉapelo tiom da ovoĵ, kiom mi volas. Ĉu iu sinjoro kompleze pruntedonos al mi sian ĉapelon? Ha! Dankon. Ek!

Li eltiris dek sep ovoĵojn, kaj dum kelkaj sekundoj la spektantaro ekpensis, ke tio estas mirinda. Tiam sinjoro Kompetentul' flustris el la fronta seĝaro:

— Li havas kokinon en la maniko. Kaj ĉiuj plufustris:



Smagin Maksim [Jekaterinburg, Rusio]

— Li havas multe da kokinoj en la maniko.

Tio pludaŭris. Oni eksciis, el la Kompetentula flustrado, ke la magiisto certe kaŝis en la maniko, krom ringojn, kokinojn kaj fiŝojn, ankaŭ plurajn ludkartarojn, tutan panon, puplulilon, vivantan kobajon, duongroŝan moneron kaj lulseĝon.

La brilo de la magiisto rapide estingiĝis ĝis plena nokto. Ĉe la spektakla fino li streĉis siajn fortojn al lasta strebo:

— Gesinjoroj, li diris, mi konkludos per la fama Japana lertaĵo. Ĉu vi konsentos, Sinjoro, li diris, turnante sin al la kompetentulo, afable prezenti al mi vian horloĝon?

Ĝi estis transdonita.

— Ĉu vi permesas, ke mi pistu ĝin en tiu pistujo? - li petis per spita tono.

La kompetentulo ridetante kapjesis. La magiisto enĵetis la horloĝon kaj kaptis martelon el la tablo. Oni aŭdis krakan bruon.

— Li ŝovis ĝin en la manikon, flustris Kompetentul'.

— Nun, Sinjoro, daŭrigis la magiisto, ĉu vi permesas, ke mi prenu vian tukon kaj truigu ĝin? Dankon. Vi vidas, gesinjoroj: estas nenia trompo; la truoj estas klare videblaj.

La vizaĝo de Kompetentul' estis ronda pro surprizo. Ĉi-foje la vera mistero de l' afero mirigis lin.

— Kaj nun, Sinjoro, ĉu vi bonvolas transdoni vian silkan cilindran ĉapelon, kaj konsenti, ke mi pied-premu ĝin? Dankon.

La magiisto faris kelkajn lertajn danco-paŝojn, kaj montris la ĉapelon platigitan ĝis nereconebleco.

— Ĉu vi nun konsentos demeti vian celuloïdan kolumon, ke mi bruligu ĝin ĉe la kandelo? Dankon, Sinjoro. Kaj ĉu vi permesas, ke mi dispistu viajn okulvitrojn per mia martelo? Dankon.

Tiam la trajtoj de Kompetentul' prenis konfuzan esprimon:

— Tio superas min, - li flustris, - mi nenion komprenas.

Estis granda silento ĉe la spektantaro. Tiam konkludis la magiisto:

— Gesinjoroj, rimarku, ke kun la permeso de tiu ĝentilmano, mi rompis lian horloĝon, bruligis lian kolumon, truis lian tukon kaj dancis sur lia ĉapelo. Se li donos al mi la permeson farbi lian mantelon per verdaj strioj, estos al mi plezuro distri vin. Se ne, la spektaklo nun finiĝis.

Kaj en orkestra muzik-eksplodo la kurteno falis, kaj la spektintoj disigiĝis en konvinko, ke almenaŭ ĝis certa grado, la lertaĵoj ne kaŝiĝas en la magista maniko.

Ĉu vi scias?

Bill Thorne [Londono, Britio]

kolektis kaj esperantigis

Hans-Georg Kaiser [Altenburg, Germanio]

...Ke la plej multaj armiloj


de la indiĝenoj en Aŭstralio estas faritaj el ligno; lancoj kaj ĵetlancoj havas pintojn el prilaborita ŝtono. Sed la plej ofte uzata armilo estas la bumerango, je du flankoj diverse platigita kaj kurbigita ĵetligno el eŭkalipto aŭ akacio, kiu estas longa ĝis unu metro. Ĝia genueca formo kaŭzas, ke ĝi post la ĵetigo sur longe etendiĝanta helica linio revenas al la ĵetinto, kompreneble nur tiam, se ĝi ne trafis antaŭe iun celon. Forta viro povas ĵeti bumerangon je 200 metrojn. La rapida ĵetligno kolektas dum la flugo tian nekredetlan forton, ke ĝi povas mortigi bestojn aŭ eĉ homon.

Joachim Ringelnatz

elgermanigis Cezar

Estis iam bumerang'


Flugis iam bumerang',
tro oblonga, kiel stang'.
Bumerang' - eĉ post hor' -
ne revenis el la for'.
Longe gapis, vang' al vang',
la publik' pro bumerang'.



...Ke multaj migraj birdoj flugas en V-formacio?

Longdistancaj flugantoj kiel la sovaĝaj anasoj kaj anseroj flugas en V-formacio, ĉar ĉiu birdo ŝparas forton pro la estigita aerfluo de sia antaŭfluganta birdokamarado. La eltenpovo de la grupo altiĝas per tio je pli ol sepdek procentoj. Dum la longaj flugoj oni regule anstataŭas la birdon, flugantan en la pinto. Ĉiu birdo gvidas la formacion dum certa tempo. Jen efektive bona modelo por la kunagado en komunumo!

...Ke koloroj de la ĉielo dependas de polvo?



Kiam nia vetero estas seka, je sunsubiro, polvo en la atmosfero filtrigas ĝian lumon. Pro la angulo, la polvo estas pli "dika", (vidu bildon) do, tra ĝi penetras la plej longaj ondoj da sunlumo, la ruĝaj, kaj ni havas "ruĝan ĉielon". Kiam la suno estas supre, la sama polvo denove filtrigas sunlumojn, kaj ni vidas ĉielon tra pli maldika polvo, kaj ĝi aspektas blua, preskaŭ la alia ekstremo de la videbla spektro.

Selektis kaj esperantigis Valentin Ĥodikov

[Slavgorod, Rusio]

Ĉu vi scias, ke...

... Otelo estis venecia maŭro, sed ne negro, kiel oni kutimas prezenti lin en pluraj teatroj - maŭroj estas araboj.

*

... Albert Ejnŝtejn ricevis Nobelpremion ne pro "Teorio de relativeco", sed pro la esploroj de fotoefekto.

*

... nenium paperfolion eblas faldi poduone pli ol 7-foje!

*

... la unua posedanto de tabakkompanio mortis pro la kancero de pulmoj

*

... kri-voĉoj de anasoj ne donas eĥon, neniu scias kial?


*

... elefanto estas la sola besto, kiu ne scipovas salti.

*

... serpentoj tute ne estas humid-glitaj kaj malvarmaj, sed ili estas sekaj, varmaj kaj percepte agrablaj, se tuŝi ilin. Interese, ke kobro tute ne dancas ĉe akompano de la fluto de fakiro, sed sekvas ties movojn, singardante, ke oni povas bati ĝin per tiu bastoneto.

Perevalov Jurij [Lesnoj, Rusio]




Vladimir Plunguian?
Elrusigis **Sergej Paĥomov** [Kirov, Rusio]

Kiuj lingvoj similas unu al la alia?

Difini, ĉu estas du lingvoj similaj aŭ malsimilaj estas sufiĉe facile. Sed la simileco mem povas havi diversajn kialojn, sed por lingvistoj multe pli interese estas kompreni *kial* du lingvoj similas. Lingvoj kondukas kvazaŭ homoj. Ĉu ofte ni renkontas fratojn kaj fratinojn, tute malsimilajn karaktere kaj aspekte? Aliflanke okazas, ke homoj, ne parencoj, vivantaj longdaŭre kune, iĝas tre similaj, eĉ pli ol gefratoj.

Same okazas al lingvoj. Similaj lingvoj povas esti la parencoj, tamen ne ĉiuj parencaj lingvoj estas similaj, kaj kelkaj similaj lingvoj ne estas parencoj. Ankaŭ lingvoj povas iĝi similaj kaze se ili longe vivas kune kaj multaj vortoj penetras el unu lingvo en la alian. Kiel tio ĉi okazas? Jen ekzemple estas angla lingvo. Ĝi havas tre komplikajn, interesajn historiojn. Nuntempe anglalingve parolas multaj landoj en Ameriko, Afriko, Aŭstralio, Azio, Eŭropo kaj en aliaj landoj ĝin oni studas diversgrade. Sed antaŭ 700 jaroj en tiu lingvo oni parolis nur en kelkaj insuloj nord-okcidente de Eŭropo. La insuloj nomiĝas Britaj. La popolojn de la insuloj regis komence Danaj konkerintoj, poste Normandaj. Danaj konkerintoj parolis en antikva lingvo, simila al la nunaj Dana aŭ Sveda, sed Normandoj parolis en alia antikva lingvo, simila al la nuna Franca. Ĉi nomiĝas la Malnova-franca.



Bill Thorne [Londono, Britio]

Rezulte multaj vortoj en moderna angla lingvo estas similaj al la francaj, kvankam la plej proksimaj parencoj de la angla estas (oni opinias tiel) la holanda kaj germana. Ni komparu kelkajn tre uzatajn vortojn el tiuj lingvoj.

Estas tre bone vidata, kiom la angla estas influita de la franca. La angla iom malproksimiĝis de parencaj holanda kaj germana. Tamen rimarku, ke nunaj anglaj vortoj pli similas al la malnov-francaj, ol ai la modernaj francaj, ĉar la angla prenis francajn vortojn antike.

Ekzemple, en la malnov-franca la kombino *ch* signifas sonon ĉ, sed nuntempaj francoj prononcas ĝin kiel ŝ. La angloj ja prononcas la sonon same kiel prononcis praavoj de nunaj francoj.

Certe, la angla similas al siaj proksimaj parencoj kaj tion ni vidas laŭ aliaj anglaj vortoj, kiuj ne trafis la tabelon. La vorto *muso* estas holande *muis* (mjojs), germane *Maus*, ankaŭ angle *mouse* (maus), sed france la vorto sonas tute alie: *souris* (suri'). Sed gravas ke la angla iĝis simila ankaŭ al la franca, eĉ multe pli ol la germana kaj holanda kune prenitaj.

Signifo	La Holanda	La Germana	La Angla	La Malnov-franca	La nuna Franca
Aglo	adelaar	Adler	eagle	aigle	aigle
	'adelaar	'adler	lgl	ajgle	egl
Monto	berg	Berg	mountain	montaine	montagne
	berh	—	'mauntin	montajne	montanj'
floro	bloem	Blume	flower	flour	fleur
	blum	—	'flauer	—	fljor
seĝo	stoel	Stuhl	chair	chaire	chaire
	stul	štul	ĉear	ĉajre	ŝer
paco	vrede	Frieden	peace	paiz	paix
	frede	'friden	pis	pajc	pe

Se iuj el vi ne scipovas legi en la lingvoj, mi sub ĉiu vorto skribis en Esperanto ĝian proksimuman prononcadon.

Sed okazas male. Lingvistoj scias, ke ekzemple du lingvoj parenkas, sed similajn vortojn ekde unua rigardo vi apenaŭ povas difini. Jen Franca lingvo havas proksimajn parencojn: la Italan kaj la Rumanan. Ni provu kompari kelkajn vortojn el tiuj lingvoj:

Signifo	Franca	Rumana	Itala
Akvo	eau o	apa ape	acqua akua
Lakto	lait le	lapte —	latte —
Fajro	feu fjo	foc fok	fuoco fuoko
Fingro	doigt dua'	deget —	Ditto —
Nigra	noir nuar'	negru —	nero —
Bovido	veua vo	vitel vicel'	vitello vitello

La simileco inter la Rumanaj kaj Italaj vortoj estas tre granda (tiel devas esti por proksimaj parencoj) nur kelkaj konsonantoj kaj vokaloj iomete distingiĝas. Sed la Franca distingiĝas rimarkinde. Kaj se ne scii ke ĝi (la Franca) estas parenco de la Itala kaj Rumana, la paro *o* – *akua* apenaŭ konvinkos vin en tio. Rigardu do kiel la francaj vortoj preskaŭ ĉiam estas pli mallongaj ol la rumana kaj precipe itala, kaj kiel ŝanĝiĝas en ili sonoj.

Kion do ni havas? La lingvoj estas similaj kaj malsimilaj. En la similaj lingvoj plejparto da vortoj estas la samaj aŭ iomete distingiĝas, ankaŭ similas ilia gramatiko. Se la lingvoj similas do supozeble ili parenkas, sed ne nepras: ĉar reale okazas, ke malsimilaj lingvoj parenkas, aŭ similaj lingvoj malparenkas.

Post iom da tempo ni provu klarigi kio ja estas parencaj lingvoj kaj kial unuj parencaj lingvoj pli similas unu al la alia sed la ceteraj malpli similas. Sed komence ni eksci pri kelkaj tre gravaj ecoj de ĉiuj lingvoj komune.

la temo daŭrigota

LINGVAJ RESPONDOJ L. L. Zamenhof

Pri la senco de "certa"

Krom sia ĉefa senco, la vorto "certa" havas ankoraŭ la senco de "iu" (ne en la senco de "kiu ajn", sed en la senco de "iu difinita"); la uzado de "certa" en la senco de "iu" tute ne estas franclingvaĵo, ĉar tiel same oni uzas tiun vorton en la lingvoj germana, rusa, pola kaj aliaj.

Respondo 57,

Oficiala Gazeto, 6, 1911, p.223



Pri "onin" kaj "onia"

Pri la formo "ĉio ĉi"

Anstataŭ "ĉio tio ĉi" vi povas tre bone diri "ĉio ĉi", ĉar la vorto "ĉi" jam per si mem signifas proksiman montron.

La Esperantisto, 1889, p. 15

Pri la vortoj kun "ĉi"

Ni havas egalan rajton uzi la "ĉi" antaŭ aŭ post la pronomo (aŭ adverbo); sed ĉar la "ĉi" estas tiel forte ligita kun sia pronomo, ke ili ambaŭ prezentas kvazaŭ unu vorton, kaj ĉar tiu kvazaŭ-unu-vorto per la loko de sia akcento faras inpreson de neharmonia escepto inter ĉiuj vortoj de Esperanto, tial pro belsoneco ordinare estas preferinde starigi "ĉi" antaŭ la montra vorto. La uzado de streketo inter la montra vorto kaj "ĉi" (t.e. skribado "tiu-ĉi aŭ "ĉi-tiu" anstataŭ "tiu ĉi" aŭ "ĉi tiu") ŝajnas al mi nur simpla erara kutimo, kiun nenio pravigas.


Respondo 52, *Oficiala Gazeto*, 6, 1911, p.2

Akuzativo kaj pronomo poseda de la vorto "oni" estas per si mem formoj tute regulaj, kaj ĉiu havas plenan rajton ilin uzi, ĉar nenie en la "Fundamento" estas dirite, ke oni prezentas escepton el ĉiuj aliaj analogiaj pronomoj. Nur en la *praktiko* oni ĝis nun ne uzadis la formon "onin", kaj "onia", ĉar preskaŭ en ĉiuj plej garvaj lingvoj la vorto "oni" ne ŝanĝiĝas kaj la akuzativo kaj adjektivo de tiu ĉi vorto sonus tre strange en la oreloj de la plimulto de la Esperantistoj. Sed en Esperanto la "nektimeco" ne prezentas gravan kaŭzon por neuzado; tial, kvankam mi persone ĉiam evitas la diritajn formojn, tamen, se iu ilin uzus, mi neniel povus vidi en tio ĉi ian pekon kontraŭ la reguloj aŭ kontraŭ la komuna spirito de nia lingvo.

Respondo 22, *La Revuo*, 1907, Aŭgusto

Bona konsilo ĉiam estas utila, aŭ kiel funkcias diversaj sistemoj

AF[☹]IRISM[☺]J Leĝoj de Merfi



Leĝoj de Parkinson

La nombro de la personaro plimultiĝas sendepende de tio, ĉu la laboro plimultiĝas, malplimultiĝas aŭ mankas tute.

Elspezoj emas egali al enspezoj.

Progreso de scienco estas male proporcia al la nombro de eldonataj revuoj.

Planata graveco kaj komplikeco de la tasko kreskas rekte proporcie al tempo, donita por ĝia solvo.

Ajna laboristo aŭ oficisto komencas perdi profesion lertecon je kvin jaroj antaŭ sia pensiŭĝo, sendepende de la aĝo de tiu pensiŭĝo.

Aksiomoj

La oficistoj emas plimultiĝi nombron de siaj subranguloj, sed ne konkurantojn.

La oficistoj kreas laboron unu por la alia.

Leĝo de prokrasto

Prokrasto – estas la plej bona formo de rifuzo.

Leĝo de telefono

Efektiveco de telefonparolo estas male proporcia al tempo, elspezita por tiu parolo.

Se iu malagrablaĵo povas okazi, ĝi nepre okazos.

Ĉio estas ne tiom facila, kiel al vi ŝajnas.

Ajna laboro postulas pli da tempo, ol vi pensas.

El ĉiuj eblaj malagrablaĵoj okazos ĝuste tiu, malprofito de kiu estos maksimuma.

Ju pli komplika kaj grandioza estas plano, des pli da ŝancoj, ke ĝi ne efektiviĝos.

Por plej multo da operacioj estas bezonataj tri manoj.

Ne eblas ripari tion, kio ne rompiĝis.

Nenion forĵetu!

Se en la oficaj dokumentoj ĉio bonordos, tiam nepre oni ion misfaros en la poŝtejo.

Elemento de skemo, kiu havas plej kurtan garantian labortempon situas en la plej malfacile atingebla loko.

Restintaj post riparo ŝraŭboj neniam koincidas kun la restintaj ŝraŭbingoj.

Se kvar kialoj de ĉiuj eblaj misfunkcioj jam estas forigitaj, nepre troviĝos iu kvina.

Kolektis kaj esperantigis Satnikov Sergej [Medvedevo, Rusio]

El vivo de bestoj, utilaj por homoj...



Kisin Aleksandr [Kosja, Rusio]

- Nu, sinjoro, - diras kuracisto al malsanulo post ekzamenado de tiu, - vi nepre devas veni en la hospitalon por operacio.

- Ne, sinjoro doktoro, prefere mi mortu.

- Vidu, unua ne malhelpas la alian.

- Doktoro, ĉe mi la kapo doloras.

- Ankaŭ ĉe mi.

- Kaj la koro malsanas.

- Ankaŭ ĉe mi.

- Kaj la hepato malsanetas.

- Ankaŭ ĉe mi. Paŭzo.

- Vi scias, prefere mi vizitos alian kuraciston.

- Atendu momenton. Mi iros kun vi.

- Nia hundo estas tiel saĝa, ke kiam ĝi volas eniri hejmen, ĝi sonorigas en la pordan sonorilon.

- Tio estas nenio. Nia hundo havas propran ŝlosilon!

*

Unu fiŝisto portas sur la ŝultroj grandegan fiŝegon, eble 50 kg pezan, apenaŭ li paŝas pro ties pezo. Renkontas lin alia fiŝisto kun siteleto de ĵuskaptitaj karasoj kaj ironie demandas:

- Ĉu, nur unusolan fiŝon vi kaptis?

*

- Vi scias, mia hundo tute pigriĝis.

- Kio al ĝi okazis?

- Antaŭe, por promeni, ĝi portadis al mi sian tirrimenon, kaj nun - ŝlosilon de la aŭto.

*

Urso ĉasis leporon kaj postkuris lin, sed baldaŭ laciĝis. Eksidis kaj ekpensis:

- Estas bone, ke mi lin kaptadis. Sed se li - min?!

Instruistino en lernejo:

- Kiuj birdoj estas plej utilaj por homoj?

Huligano Vovoĉka:

- Kuiritaj, - s-ino instruistino.

*

- Se vi bone kondutos dum la tuta semajno, mi prenos vin kun mi al la maro dum la venonta somero - diras la patrino al la filo.

- Se vi finos la lernojaron bone, ni aĉetos por vi belan hundidon, pri kiu vi revis - aldonas la patro.


- Bone, sed kion mi devus nun fari, por ke mi tuj foriru al kinejo? - demandas la knabo fine.

*

Ĉevalo al azeno:

- Ni, ĉevaloj, estas la plej nobla raso inter la homaj amikoj. Ni helpas al homoj, faciligas ilian laboron, beligas la vivon, helpas dum milito kaj ripozo!

- Jes, vi pravas, sed vin fin-fine forpelos maŝinoj, sed la azenoj neniam malaperos!



Všivceva Galja, 12 jaroj [Miass, Rusio]

Lev Tolstoj

Esperantigis Jaroŝenko Jelena [Volgodonsk, Rusio]

Ŝtono

Malriĉulo venis al riĉulo kaj petis almozon.. La riĉulo nenion donis kaj diris: “Foriru.” Sed la malriĉulo ne foriris. Tiam la riĉulo ekkoleris, levis ŝtonon kaj ĵetis ĝin en la malriĉulon. La malriĉulo levis la ŝtonon, metis ĝin en la poŝon kaj diris: “Ĝis certa tempo mi kunportados ĉi tiun ŝtonon, atendante oportunan okazon ankaŭ ĵeti la ŝtonon en lin”.

Kaj tempo pasis. La riĉulo faris iun kontraŭleĝan aferon, oni lin arestis kaj konfiskis ĉion, kion li posedis. Kiam oni veturigis lin en la prizanon, la malriĉulo proksimiĝis al la riĉulo, elprenis la ŝtonon el la poŝo kaj batminacis la riĉulon; sed subite li ekmeditis, forĵetis la ŝtonon teren kaj diris: “Vane mi tiel longe portadis ĉi tiun ŝtonon: kiam li estis riĉa kaj forta, mi timis lin, sed nuntempe mi kompatas lin.

Leksina Ludmila [Sudĵa, Rusio]

La plej feliĉaj

Mi longe pensis, kiuj homoj estas la plej feliĉaj? Ĉu, tiuj, kiuj estas junaj, belaj, sanaj kaj riĉaj? Ho, ne! Juneco, beleco rapide foriras. Sano malaperas. Riĉeco ofte iĝas la kaŭzo de envio kaj malamo.

Mi memoras geedzojn, kiuj estis najbaroj de miaj gepatroj. Ili ĉiam iris kune, subtenante unu la alian kaj feliĉe ridetis. Li estis la juna alta bela viro, ŝi estis... la maljuna malalta ĝibulino kun vizaĝo, kovrita per cikatroj kaj kun fermitaj okuloj. Ili estis blindaj. Kaj tial ili ne sciis, kio estas eksteraj beleco kaj riĉeco. Ili vidis per koroj, vidis nur animojn.

Lastatempe mi foj-foje vidis ankaŭ strangan paron. Malalta viro iris kaj kondukis biciklon, sur kiu sidis ne juna virino. Oni al mi diris, ke ili loĝas en malgranda kaj malriĉa vilaĝeto en arbaro, ke la virino havas la malsanajn piedojn. Kaj tial la edzo de tempo al tempo tiamaniere veturigas ŝin al la urbo.

Foje mi atente deproksime ekrigardis ilin. La virino sidis sur la biciklo kvazaŭ sur trono.

“Kia fera beleco!” — pensis mi, ekvidinte ŝian vizaĝon.

La viro havas ordinaran eksteron kaj malriĉan veston. Sed li estis gaja kaj feliĉa, kaj tute ne laca. “La reĝino kaj ŝia kavaliro” — nomis mi ilin.

Laŭ modernaj opinioj viro devas donaci al amata virino riĉan veston, juvelojn, aŭtojn...

Modernaj viroj! Ĉu iu el vi povas tiel veturigi amatan virinon kaj esti pro tio feliĉa kaj gaja? Ja vojo estas 71 kilometroj tien kaj reen tra la marĉo kaj montetoj!



Santi Elena Bullo [Mestre, Italio]

国 际 广 播 电 台 世 界 语 部



Ĉina Radio Internacia

Ĉina Radio Internacia (ĈRI), fondita en la 3-a de decembro 1941, estas la ĉina ununura ŝtata radiostacio por mondskala radio-disaŭdigo. Ĝi celas akceli interkomprenon kaj amikecon inter la ĉina popolo kaj la popoloj de la mondo. En sia komenca periodo ĈRI disaŭdigis nur 15-minutan programon en la japana lingvo. Post 60 jaroj, ĈRI nun disaŭdigas 211 horojn da programoj ĉiutage al la tuta mondo en Esperanto, 37 fremdaj lingvoj, kvar ĉinaj dialektoj kaj la ĉina komuna lingvo Putonghua. La programoj kovrantaj la tutan terglobon konsistas el novaĵoj, kurantaj aferoj kaj fakaj programoj pri politiko, ekonomio, kulturo, scienco, tekniko, sporto kaj aliaj temoj. De 1984 ĈRI sinsekve disaŭdigas AM kaj FM programojn en la lingvoj angla, araba, franca, germana, hispana, japana, korea kaj rusa kaj ankaŭ en la kantona dialekto al aŭskultantoj en Ĉinio. La ampleksa informa reto de ĈRI konsistas el 27 korespondaj oficejoj sur ĉiuj kontinentoj. ĈRI ĉiujare ricevas pli ol 600 milojn da korespondajoj el proksimume 200 landoj kaj regionoj kaj estas intime titolita de en- kaj ekster-landaj aŭskultantoj kiel "ponto kaj ligilo de interkomunikado kaj interfluo inter Ĉinio kaj aliaj landoj" kaj "fenestro por plej rapida, plej facila kaj plej efika konado pri Ĉinio". Ĉe la fino de 1998, la Interreto de ĈRI oficiale ekfunkciis. En la komenco la Interreto de ĈRI estis unu el la 5 gravaj ŝtataj informaj retoj.

UTC	Regionoj	Ondoj (m)	kHz
11:00 — 12:00	Japanio, Koreio	31,55 * 41,96	9510 * 7150
13:00 — 14:00	Sudorienta Azio	25,75 * 31,78	11650 * 9440
19:30 — 20:30	Eŭropo	30,86 * 41,29	9720 * 7265
22:00 — 23:00	Latin-Ameriko	30,43 * 25,64	9860 * 11700

Esperanto-redakcio

Ĉina Radio Internacia (ĈRI, antaŭe Radio Pekino) komencis la Esperantan disaŭdigon en la 19-a de decembro, 1964. Ĉiutage la Esperanto-disaŭdigo direktiĝas po unu horo respektive al Eŭropo, Latin-Ameriko, Nordorienta Azio kaj Sudorienta Azio, kun novaĵoj, raporto aŭ komento pri gravaj eventoj kaj kun jenaj programoj: Leterketo, Vojaĝo en Ĉinio, Ĉina Kulturo, Ekonomia Panoramo, Socia Vivo, Esperanto en Marŝo, Dimanĉo, Muzika Programero, k.t.p.

Esperanto-redakcio de ĈRI ankaŭ de tempo al tempo renovigas rubrikojn laŭ aktuala bezono aŭ propono de aŭskultantoj. Cetere, ĝi donas de tempo al tempo specialan programon pri io grava, okazigas aktivadon pri aparta temo kaj aranĝas konkurson.

La Esperanto-redakcio de ĈRI ĉiam deziras pli bone servi al diverslandaj aŭskultantoj kaj sincere bonvenigas iliajn kritikojn kaj proponojn.

Konstanta adreso:

Esperanto-redakcio, CRI-36,
Ĉina Radio Internacia Poŝt-
kesto 4216, Ĉinio, 100040

Retadreso:

espradio@cri.com.cn

Retpaĝo:

<http://esperanto.cri.com.cn>

Bill Thorne



RIMARO

*Por niaj novaj abonantoj:
jam la trian jaron ni pub-
likigas la RIMARON,
kompilitan de Bill Thorne
en alfabeto ordo.
Ĝi estas helpilo por
komencantaj E-poetoj.*

IO

abio	komedio
akvario	kompanio
ambicio	kopio
anarkio	koterio
anatomio	kranio
antipatio	materio
apatio	medio
arterio	melodio
artilerio	metio
aŭkcio	operacio
biblio	ortografio
ceremonio	papilio
cikonio	partio
defio	pensio
dio	poezio
emocio	porcio
energio	religio
envio	restoracio
ferio	rezolucio
filio	scio
garantio	sekretario
glacio	seminario
harmonio	serio
historio	simio
hobio	skio
iluzio	strio
industrio	teorio
inercio	familio
inflacio	taksio
ironio	talio
junio	telepatio
julio	utopio
kemio	

Anoncetoj

Informoj

Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj aŭ 2 IRK por eksterlandanoj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Mi estas komencanto dez. kor. por plibonigi mian E-ton. Int: birdobservado, piedekskursi, muziko.

s-ro *Thierry Tailhades*

61 rue Henri Gorjus
69004 Lyon,

Francio

thierry.tailhades@wanadoo.fr

Mi estas 14 jara knabino. Mi ŝatas legi, kolekti, muzikon kaj korpopilkon. Mi volas korespondi kun esperantistoj el la tuta mondo

Angela Kanjuo

Milana Frlana 22
Matulji, HR 51211

Kroatio

Mi estas 43a viro, kiu komencas paroli E-ton, mi volas korespondi kun aliaj. Int: Kulturoj, lingvoj, muziko

s-ro *Hans Pinkse*

Zuider Kerkedijk 309,
Rotterdam,

Nederlando

ninkseha@wxs.nl


Mi estas sisteminĝeniero, nova esperantisto el Meksiko kaj mi serĉas geamikojn tutmonde. Int: aliaj lingvoj...

s-ro *Mauricio Monroy*

Meksikurbo

Meksiko

mmonroy@nctmex.com



Mi estas 31-jara knabo, kiu volas korespondi paper-poŝte. Mi volas koni kutiman vivon de aliaj landoj. Int: manĝi kun vino trankvil-parolante, legi, vojaĝi; aliaj lingvoj, muziko.

s-ro *Morales Asensio*

Jose Antonio

Camino de las carretas,
8 Dip. Rio. Carretera de
Caravaca. 30817 Lorca
Murcia

Hispanio

jocio@eresmas.com

KOMENCANTO

restas revuo por vi en 2004!

Mi estas 24 jara fraŭlo, studento komencanto. Intereso: religio, budaismo, motorbiciklo, vojaĝo. Se vi havas intereson pri religia afero aŭ japanaj kulturoj - kontaktu min! (Mi ne estas bonzo, eĉ mi ne estas rigora budaisto.) Kaj mi ŝatas motorbiciklon. Mi jam iris de norda ekstremo ĝis la suda de Japanio kun mia motorbiciklo. Tokorozawa-shi estas urbo proksime de Tokio. Mi povas korespondi paper-poŝte, ret-poŝte. Via sekso, via aĝo ne gravas. Mi certe respondos al vi.

s-ro *Hayashi Kensuke*

<fst@mx15.freecom.ne.jp>

Kitano 5285-107-1-404,

Tkoroza-wa-shi, Saitama-ken, 359-1152, **Japanio**

Mi estas 28-jara, komencanto, programisto, viro kaj deziras korespondi kun eksterlandaj esperantistinoj por koni vivmanierojn kaj interŝanĝi bildkartojn, ktp. Int: amikeco, vivmanieroj, kulturo

s-ro *Claudio Araujo*

Rua Ibiapina 2322,
Conj. Panatis II, CEP:
59108-350, Natal-RN,

Brazilo

claudioediano@bol.com.br

Mi estas pensulo; Intereso: Esperanto, ŝako, sportoj, volontula radio-dissendo per E-o, veturado, organizado de vojaĝoj al Aŭstralio kaj Kroatio, tablo-ludoj, poŝtmarkokolektado, muziko, dancado, interŝanĝo de folkloraj ensembloj, organizado de E-renkontiĝoj. Mi deziras havi longtempajn kontaktojn kun esperantistinoj de 40 ĝis 50 jaraĝaj el iu ajn lando de l' mondo. Korespondado povas esti longdaŭra kaj mia intenco estas, estante fraŭlo, trovi virinon, kiu dezirus vivi kun mi ĉu en Aŭstralio, ĉu en Kroatio kie mi havas loĝejon.

s-ro *Zelimir Pehar*

Dandenong

Aŭstralio,

zpehar@yahoo.com

komencanto@r66.ru
viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj!

